

Joseph M. Scriven ,
Ho Jesu', amiko mia
tradukita de Manfredo Ratislavo

Ho Jesu', amiko mia,
Kiel alta estas vi!
Estas vi peranto nia,
Kiu ligas nin kun Di'.
Kiom da afflikto devas
Nenecese porti ni,
Se preĝante, Lin serĉante
Ni ne turnas nin al Li.

Kiam la diablo tentas
Nin kun ega energi',
Ni ne devas timi ion,
Se kredeme preĝas ni.
Jen montriĝas la fidelo
De Jesu', nin helpas Li,
Kiel la Savant' potenca.
Tiun preĝe petu ni.

Se ni estas zorgoplenaj
Kaj nin premas tio ĉi,
Certe helpas nin Jesuo,
Niajn preĝojn aŭdas Li.
Se amikoj vin forlasas,
Diru tion nur al Li!
Li vin ŝirmos kaj konsolos.
Nur al Li vin turnu vi.

...

Ho Savanto, Vi promesis,
Ke Vi portos ja por ni
Niajn ŝarĝojn, ni do portu
Ĉion preĝe nur al vi.
Baldaŭ ni ne devos preĝi
Plu sur tiu Tero ĉi,
Tie ni senfine gloros
Vin en eternec', ho Di'.

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de JOSEPH M. SCRIVEN (*1820 – †1886) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-08-24.*

MR-449-1b / Arg-372-727 (2006-08-24 09:22:30)